This is something everyone can do in his own locality without much bother. The present custom of buying books from the Esperanto book services and publishers is a good way to get them at less cost, but we should be willing to spend a little more and buy them from local book stores and encourage them to display the books for others who inquire about them.

If local Esperanto groups and individuals give their addresses local movements will gain new blood.

A

# JOSIKO VENAS!

Joŝiko Kaĵino, japana esperantistino, estas bone konata inter eŭropaj esperantistoj pro sia sukcesplena prelegvojaĝo dum 1957-1960. Ŝi trairis Danlandon, Svedlandon, Germanion, Nederlandon, Brition, Francion, Svislandon, Italion, Jugoslavion, Hispanion, Belgion, Aŭstrion, kc., kaj prelegis 300foje antaŭ 50,000 personoj. Kun elstara historio (ŝi studis psikologion, ĵurnalismon, kaj sociologion en la Universitato Waseda, kaj laboris kiel ĵurnalistino por ĵurnalo en Tokio dum ses jaroj), Joŝiko Kaĵino trairis Usonon prelegante antaŭ grupojn en multaj urboj. En Burlingame, Calif., la 23an de januaro ŝi prelegos antaŭ la metodista grupo, kaj la 17an de februaro partoprenos en programo de San Mateo. Aliaj programoj ankaŭ okazos.

Ni sugestas ke vi, en via komunumo, utiligu la okazon stimuli intereson pri esperanto per vizito de Joŝiko Kaĵino. Por detaloj kontaktu William kaj Catherine Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, California.

---

## NIAJ MORTINTOJ

Ni bedaŭras anonci, ke ni lastatempe ricevis sciigojn ke mortis *George Saville*, Los Angeles 46., Cal.

---

## PREĜO POR LA HOMARO

Post la plej malluma horo de la nokto,  
la matenruĝo aperas  
El la nigra kavado de malespero  
Brilas radio de lumo  
Kiam la mondo estas kaŝita per malsaneco,  
dubo kaj timoj  
Dio donas al la Homo kuracilon  
Por ĝia tuta velkeco.

Dum la homo mem turniĝas en profundan  
malhelecon  
Kiam mondaj koroj pleniĝas per doloro  
kaj timego  
Denove la preĝo por la venkiĝo de tiraneco  
Kaj la venigado de vivo, ekkreskas en koroj  
de longe mortaj.

Ĉu ni povas kiel antaŭirantoj de printempo  
Kaj espero kaj amo kaj de vivo mem,  
esti liberaj  
Kaj ne alporti esperon al aliaj animoj  
de l' homaro  
Kiuj vivas kaj mortas en malluma vano?

Catherine R. Thompson

●

Pri la serio "Ni Rekomendas": Legantoj rimarkis, sendube, ke en julio de la pasinta jaro la Revuo komencis aperigi en la recez-sekcio serion da recenzetoj sub la rubriko "Ni Rekomendas," po unu en ĉiu numero. La celo de la rubriko estas simpla: pro la konstanta alfluo de libroj recenzendaj, kaj la neebleco juste pritrakti ĉiun el ili en la malmulta spaco disponebla, ni opinias ke ofte vere valora aŭ atentinda libro perdiĝas en longa listo de libroj ricevataj. Ni ankaŭ opinias ke, eble, kelkaj legantoj (kiuj ja ne povas aĉeti

La vento kaj la suno iam disputis. La disputo estis: Kiu estas la plej forta - suno aŭ vento? Ŝajnis ke ne estas solvo por la disputo. Subite ili ekvidis vojaĝanton kiu marŝas sur la vojo.

“Jen okazo” diris la suno, “por pruvi kiu pravas, vi aŭ mi. Kiu ajn el ni sukcesos instigi tiun homon demeti sian jakon pruvigos la pli forta. Por montri al vi kiom mi min fidas, mi lasos al vi la unuan provon.” “Dankon, diris la vento, vi tion bedaŭros.”

Do la suno sin kaŝis malantaŭ nuboj kaj la vento ekblovegis glacie. Ju pli la vento blovis des pli firme la viro ĉirkaŭvolvis sian jakon. Finfine la vento senesperiĝis kaj ĉesis.

Poste la suno ekbrulis per plena forto sur la vojaĝanton.

La vojaĝanto sentis la afablan varmecon de la suno, kaj ju pli li varmiĝis des pli li malstreĉis la jakon. Finfine, li devis depreni ĝin tute kaj sidi en la ombro de arbo kaj ventumi sin. Do, la suno fine pravis.

Moralajo: La instruo de la fabelo, kiun mi ĵus rakontis estas -

Persvado estas pli bona ol perforto, aŭ, oni povas kapti pli da muŝoj per mielo ol per vinagro, aŭ, karoto antaŭ azeno pli bone efikas ol vipo malantaŭ.

A dispute once arose between the wind and the sun over which was the stronger of the two. There seemed to be no way of settling the issue. But suddenly they saw a traveler coming down the road.

“This is our chance,” said the sun, “to prove who is right. Whichever of us can make that man take off his coat shall be the stronger. And just to show you how sure I am, I’ll let you have the first chance.”

So the sun hid behind a cloud, and the wind blew an icy blast. But the harder he blew the more closely did the traveler wrap his coat around him. At last the wind had to give up in disgust.

Then the sun came out from behind the cloud and began to shine down upon the traveler with all his power. The traveler felt the sun’s genial warmth, and as he grew warmer and warmer he began to loosen his coat. Finally he was forced to take it off altogether and to sit down in the shade of a tree and fan himself. So the sun was right, after all!

Moral: Persuasion is better than Force.

Bill Schulze

Ĉiun libron novan) ŝatas scii kiujn librojn la redaktoro speciale rekomendas. Tial, sub la “Ni Rekomendas” - rubriko ni listas ĉiunumere novaperintan libron kiu

pro siaj enhavo, aspekto, kaj ĝenerala enhavo estas vere elstara. Ĝi estas, se oni volas tiel nomi ĝin, ia “book of the month” - rekomendo esperanta.

in Chicago where East Coast and West Coast Esperantists can most easily meet

July 6-7-8, 1962

Plan now to attend. Your enthusiastic presence is needed. You will be richly rewarded in satisfaction, fellowship, and friendship and delighted with the charms of this city. Chicago's Esperantists will welcome and assist you. This summer is the time to visit CHICAGO.

## SILABENIGMO

En 1910 en Parizo, Francujo, de "Librairie Hachette et C-ie" estis eldonita la libro "L.L.Zamenhof. Proverbaro esperanta", kiu entenas 2634 proverbojn. Unu proverbo estas en tiu ĉi silabenigmo.

a, ak, bi, bo, co, ĉa, ĉe, ĉi, den, do, ek, ent, er, es, ga, gra, ĝan, ĝo, i, i, i, je, ju, ka, ko, ko, kro, len, li, lo, lo, lo, lo, lo, ma, mo, mo, na, na, na, ne, no, no, no, no, nuk, o, ob, os, pe, pe, po, po, ri, ro, ro, ro, ro, sa, so, so, so, sta, stak, ta, ten, to, to, to, to, tri, ur, vaf, ve, vo, zo.

1. birda korp parto	5 literoj	16. feliĉega sento	6 literoj
2. malhelpo	8 "	17. montana remaĉbesto	4 "
3. centra parto de rado	4 "	18. plej malgranda ero	5 "
4. kanto de alaŭdo	5 "	19. frukto	5 "
5. raviĝo de la animo	7 "	20. hinda marĉbarbo	7 "
6. tubera legomo	4 "	21. nefrakcia nombro	7 "
7. okazo fari malbonon	5 "	22. fabaca legomo	5 "
8. longkrura birdo	5 "	23. granda markrustulo	5 "
9. krio de korvo	5 "	24. blanka akvo	4 "
10. sankta bildo	5 "	25. neprilaborita metalo	4 "
11. gvidisto por fremduloj	8 "	26. granda marbirdo	8 "
12. tute simila	6 "	27. interna parto de la korpo	4 "
13. granda besto	4 "	28. plata kuko	5 "
14. malgranda ornamaĵo	6 "	29. saltinsekto	6 "
15. parto de preĝejo	4 "	30. granda trezoro	4 "

Legante de supro malsupren la unuaj literoj de trovendaj vortoj donas interesan proverbon. La solvon bonvolu sendi al la redaktoro de "Esperanto Revuo". La nomoj de solvintoj estos publikitaj. Ensendita de A. Holzhaus, Chicago, Ill.





GEORGE SAVILLE

## Bonan Tagon, S-ro Prezidanto



Li estis maljuna farmisto de la Ŝtato Iowa; li aspektis kiel multaj aliaj farinistoj: malrapidema, distorditaj manoj, okulvitroj, ŝelkoj, akra nazo, blankaj lip-haroj, bluaj suspektemaj okuloj, mallertaj ŝuoj, kaj naza, ĉiam plendanta voĉtono. Li estis en vagonaro celanta al Vaŝingtono.

“Kiam ni atingos la ĉefurbon, portisto?” li demandis, la kvindekan fojon rigardante sian arĝentan bulboforman horloĝon.

“Morgaŭ matene je la sepa, mastro,” diris la negro.

“Dankon.” La Iowano fermis sian buŝon pli firme, sed lia koro pli rapide ekbatis.

Sepan horon matene! Post tiom da jaroj! Kaj je la deka horo li estos vicestara en la “Blanka Domo” kaj ekpremos la manon de l’ prezidanto! Mia Dio! Steloj kaj serpentoj! La nura penso sufiĉas por ke koro usona ekbatu!

“La Parlamentano de mia distrikto aranĝis ĉion,” la maljunulo fiere konfidis al alia maljunulo en la fumoĉambro. “Mi ekpremos la manon de l’ prezidanto! Jes sinjoro, tiun momenton mi atendis dum kvindek jaroj!”

Poste li rakontis pri sia patro, kiu manpremis prezidanton Grant, kaj ke tio estis la plej fiera memorajo de lia vivo. Li fariĝis pro tio eminenta membro de la komunumo; li eĉ elektiĝis urba ĉefpolicisto.

“De kiam mi estis dekjara knabo, kaj aŭdis mian patron paroli pri prezidanto Grant, mi ĵuris veturi al Vaŝingtono kaj fari la samon, eĉ se tio kostus mian lastan cendon,” diris la maljuna Iowano. “Mi certigas vin ke ĝi estos la plej fiera momento en mia vivo. Mi alproksimiĝos al li, manpremos lin, kaj nur diros kelkajn vortojn: “Bonan matenon, sinjoro prezidanto, dum la pasintaj 40 jaroj mi balotis ĉiam por la Respublikana Partio!”

“Li estos feliĉa aŭdi tion,” diris la alia maljunulo. “Ĉi tiu lando bezonas pli grandan nombron da Respublikan-Partianoj. Mi divenas, ke la ekskurso de Iowa kostas al vi konsiderindan sumon, ĉu ne?”

“Ĝi valoras ĉiun cendon. Valoras ĉiun cendon, kiun oni havas,” respondis la Iowano.

Fakte, la ekskurso kostis ĉiun cendon, kiun li havis. Li estis tro maljuna por labori, kaj “lia” farmbieno ne estis lia - ĝi estis ĝis la limo hipotekita. Lia edzino mortis antaŭ kelkaj jaroj; ŝi falis kvazaŭ trolaborigita besto en jungilaro. Liaj du filoj forkuris el la farmbieno pro trolaborego, kaj li neniam aŭdis pri ili. Li kvazaŭ estris sklavo-farmon kie li mem estis la ĉefa sklavo. Nun li estis elĉerpita, maljuna, kaj senhava, sed glorie li premos la manon de prezidanto!

Tio-ĉi rekomencos pro ĉio; pro la sklavecaj jaroj, pro nescio kaj izoleco, pro la mankohavaj jaroj kaj pro la malnoblaj -- la malgrasaj jaroj, la monelprem-

igaj jaroj kiuj mortigis lian edzinon, forpelis liajn filojn, kaj distordis kaj ruinigis lian korpon. Jes, ĝi estos valora.

(Tiamaniere liaspecaj homoj pensas. Ili malestimas la reĝojn kaj la eluzitajn eŭropajn adorantojn de reĝo Georgo, imperiestro Vilhelmo aŭ reĝino Mario. Sed ili ĉiuj suferus malsaton, nudecon kaj malvarmon por ekpremi la manon de l' prezidanto. Jes, nenio konkreta estas gajnita - oni ne fariĝas pli saĝa, pli nobla, eĉ ne pli riĉa per tiu ago, sed ĝi kontentigas ion en iliaspeca animo. La lakeon en ĝi, eble. Aŭ ion romantikan, aŭ la malbenitan malsaĝecon. Mi ne povas ĝin diveni. Sed mi scias, ke la maniero per kiu oni povas korupti lojalan laborist-gvidanton, estas: permesi al li ekpremi la manon de l' prezidanto. Tiu ĉi artifiko funkcias egale bone kun negro-gvidantoj, subpremataj bankrotitaj farmistoj, trust-subigitaj komercistoj, kaj la klub-sinjorinoj kiuj ĝentile agitas por la forigo de infanlaboro kaj similaj aferoj. Ili ĉiuj cedus kaj cedas la lastan honorfibron por la privilegio de manpremo prezidanta. Divenu la kialon vi mem; mi devas konfesi mian malkapablon.)

La vagonaro atingis Vaŝingtonon. La Parlamentano atendis ĉe la stacidomo la Iowan farmiston kaj gvidis lin al la Blanka Domo. Tie li trovis mil aliajn kiuj atendis por manpremi kun la prezidanto. Tio mirigis lin, ĉar li revis en sia soleca farmbieno pri ia sankta kaj unika momento.

Post kvaronhora kaj kvindekjara atendo lia vico fine venis. Li estis subite puŝita de malantaŭe; li ektuŝis malvarman gluecan manon kaj ekvidis fiksecan prezidantan rideton kaj nebulaĵon de redingoto. Subite li troviĝis en vestiblo, konfuzita, inter mil aliaj konfuzitaj kompatinduloj. La tuto daŭris sekundon, tiu plenumiĝo de tutviva sopirado.

"Mi eĉ ne havis ŝancon diri al li, ke mi balotadis dum kvardek jaroj ĉiam por la Respublikana Partio," la maljuna Iovano malforte plendis al alia manpreminto; ili elpaŝis al la razeno, kaj ĝentile kvankam firme elpelis ilin grasaj detektivoj.

Jen la tuto de la rakonto. Tamen mi devas aldoni, ke la maljuna farmisto mortis ses monatojn poste; nenio grava mankis al li, la kuracisto diris, sed ŝajnis, ke li perdis sian tutan interesiĝon al la vivo. Nenio alia, vivinda, restis por li.

---

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

estas monda organizo de Esperantistoj, konsistanta el la naciaj asocioj kaj individuaj membroj. Ĝi publikigas la montan gazeton 'Esperanto', jarlibron (en du partoj), kaj funkciigas reton de deligitoj tra la mondo. Ĉiu aktiva esperantisto bezonas esti individua membro de U. E. A.

Kotizoj por 1961:

por simpla membro kiu ricevas la jarlibron:	\$ 2.25
por membro kiu ricevas la gazeton kaj jarlibron:	\$ 4.50
por subtenanta membro:	\$ 6.75
por dumviva membro:	\$ 90.00

Sendu kotizojn al, kaj petu informojn de Donald E. Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, California.

## ESPERANTO IN PLACE NAMES

As a tribute to Esperanto, or to its original author L. L. Zamenhof, 199 cities in 20 countries have officially named streets or city squares "Esperanto" or "Zamenhof." In the list which follows, the date when the street was named is given in parentheses, after the name of the street, when known.

### **Argentina:**

General Alvear: Zamenhof Street  
Venado Tuerte. Esperanto  
Street (8/6/55)

### **Austria:**

Graz: Esperanto Place (1952)  
Klagenfurt  
Knittelfeld: Esperanto Street  
(9/57)  
Linz: Zamenhof Street  
Radstaedter Tauern  
Vienna: Zamenhof Street  
(7/7/29)

### **Belgium:**

Anderlecht: Zamenhof Street  
(1960)  
Antwerp: Zamenhof Street  
(1953)

### **Brazil:**

Aracajú, Sergipe: Esperanto  
Street (3/23/32)  
Belo Horizonte, Minas Gerais:  
Esperanto place (1947)  
Campinas, Sao Paulo: Esperanto  
Street (1/24/60)  
Coracao de Jesus, Minas Gerais:  
Esperanto Place (5/7/52)  
Curitiba, Paraná: Zamenhof  
Street (1953)  
Feira de Santana, Baia  
Joao Pessoa, Paraíba: Esperanto  
Street (1949)  
Juiz de Fora, Minas Gerais, Zam-  
enhof Street (1953)  
Juiz de Fora: Minas Gerais, Zam-  
hof Street (9/25/17)

Macaiba, Rio Grande do Norte:  
Esperanto Street (1957)

Macau: Rio Grande do Norte:  
Esperanto Street

Maceió, Alagoas: Zamenhof  
Street (1957)

Macau: Rio Grande do Norte:  
Zamenhof Place (1959) and  
Esperanto Place (1959)

Nilopolis, Rio de Janeiro: Esper-  
anto Street (8/3/59)

Niterói; Rio de Janeiro: Esper-  
anto Street (8/57)

Porto Alegre, Rio Grande do Sul:  
Zamenhof Street (1937), and  
Esperanto Place (7/14/53)

Realengo, Rio de Janeiro: Esper-  
anto Street (10/5/13)

Recife Pernambuco: Esperanto  
Street (12/22/53)

Rio de Janeiro: Zamenhof Street  
(10/31/17) and a second Zam-  
enhof Street (12/15/46)

Salvador, Bahia: Esperanto  
Street, 1937)

Santa Maria, Rio Grande do Sul:  
Zamenhof Street (1959)

Sao Joao da Boa Vista, Sao  
Paulo: Zamenhof Street (1959)

Sao Paulo: Esperanto Street  
(1947)

Soledade, Rio Grande do Sul:  
Zamenhof Street (1959)

Sorocaba, Sao Paulo

Ubá, Minas Gerais: Esperanto  
(12/21/52)

**Britain:**

Bournemouth

**Bulgaria:**Asenovgrad: Esperanto Place  
(1956)

Govedarci

Jambol: Esperanto Street (1959)

Kazanlak: Esperanto Alley  
(4/6/59) and Esperanto  
Street (12/15/59)Kubrat: Zamenhof Place  
(3/10/59 and Esperanto Street  
(10/6/59)

Pazargik: Esperanto Alley

Pirdop: Zamenhof Street (1960)

Plovdiv: Zamenhof Street

Polski Trambes: Esperanto Park  
Svlievo: Esperanto Street  
(12/17/59)

Slavjanovo: Esperanto Street

Sofia: Esperanto Street (1942)  
and Zamenhof Street  
(11/21/59)

Stara Zagora: Esperanto Street

Tirnov: Esperanto Street (7/60)

Varna: Zamenhof Street (5/57)

**Canada:**Trois Rivieres: Esperanto Street  
(10/26/59)**Czechoslovakia:**

Bohumín

Bor (eq.Haida): Zamenhof Street

Bratislava: Zamenhof Street  
(1930)

Doksy

Drahovice: Esperanto Street  
(2/9/26)

Hradec Králové

Lázne Belohrad: Zamenhof Alley  
(7/19/59)

Nové Zámky: Zamenhof Street

Olomouc Street (6/27/32)

Trautenau: Esperanto Place

**France:**

Alés

Amiens: Zamenhof Street  
(1/24/31)**Angers**

Arras

Baugé: Zamenhof Street  
(7/19/59)

Benlys-sur-Mer

Boulogne-sur-Mer: Zamenhof  
Place (2/3/31)

Bourg-de-Péage (near Romans):

Zamenhof Street (12/15/59)

Cannes: Zamenhof Street  
(6/18/38)Cagnes-sur-Mer: Zamenhof  
Street (12/25/33)

Clamart: Zamenhof Street

Commentry: Zamenhof Street  
(3/13/49)

Evreux: Esperanto Street

Hagondange

Hautmont

Houilles

Hyères

Issy-les-Moulineaux: Zamenhof  
Street ((1/33)

Liévin

Limoges: Zamenhof Street  
(1907)Malakoff: Zamenhof Street  
(1934?)

Marly-les-Valenciennes

Marseille

Montbéliard: Zamenhof Street  
(8/8/33)Montreuil-Belfray: Esperanto  
Street (8/21/60)Mulhouse: Zamenhof Street  
(1/7/33)Perpignan: Zamenhof Street  
(1947)

Rivesaltes

Romans-sur-Isère

Rosendael près Dunkerque

Rueil-Malmaison

Saint-Laurent-du-var (near  
Nice): Zamenhof Street (1960)

Saint-Raphael: Zamenhof Street

Sotte-ville-les-Rouen: Zamenhof  
Street (5/24/14)

Strasbourg-Bisheim

(daŭrigota)



Cu aŭ ne vi partoprenos la universalan kongreson en Kopenhago, ĉijare, vi eble deziras uzi la glumarkon de la kongreso sur viaj leteroj. Prezo: unu folio (dek markoj) por 10¢, tri folioj (30 markoj) por 30¢. Mendu ĉe la reprezentanto de U.E.A., Donald Parrish, 328 W. 46th St., Los Angeles 37, California.

#### SUGESTO

En Nuntempa Bulgario mi legis ke la personaro de la pola ŝipo "Zamenhof" ne estas esperantistoj, sed unuopaj maristoj esprimis la deziron lerni la lingvon. Mi proponas ke nordamerikaj samideanoj kunagupor sendi aŭ (eble pli bone) mendi por ties libraro iujn Esperanto-librojn.

(sugesto sendita de Conrad Fisher)

#### Jen Aŭstralio

Ĉi tiu 25-minuta, kolora, sonfilmo esperante parolanta estas prunteprenebla en Usono. Interesataj personoj kaj grupoj bv.

#### DECIDOJ DE LA ESTRARO

La estraro **aprobis** ke la U.S. National Bank of Portland estu la oficiala banko de ELNA, kaj rajtigis ke aŭ la kaskisto, Jay Berry, aŭ iuj du el la sekvantaj estraranoj subskribu bankĉekojn por pagoj farataj de ELNA: David Richardson, Conrad Fisher, Armin Doneis.

#### NOMINATING COMMITTEE


The chairman of the Nominating Committee charged with naming candidates for this year's elections is Vincent Griffeth, 8556 37th Ave. S.W., Seattle 6, Wash. League members will vote for a secretary and three members of the Board of Directors. Anyone wishing to propose a candidate should communicate with Vincent Griffeth as soon as possible.

En Pittsburgh - Adah Miller, membro de ELNA en Coraopolis, raportas ke 23 personoj kunvenis en la Downtown YMCA la 20an de novembro, kaj organizis la Esperanto-Klubon de Pittsburgh (prezidanto Brice Owens).

kontakti la sekretarion de ELNA, Conrad Fisher, dirante por kiu dato ili volas la filmon.

#### Notice

The Esperanto League for North America is not a subscription agent for the periodical El Popola Ĉinio. The name and address of the League were included without its knowledge or consent in a list of subscription agents for the above publication. Permission to use the League's national office as an agency was in fact refused, due to the clearly political character of El Popola Ĉinio.



## NOVAJ LIBROJ

La Zamenhofa Esperanto: Simpozio Pri -Ata/Ita,  
artikoloj de De Hoog, Gregor, Kalocsay, La Colla, Lapenna, Nakamura, Pumpr,  
Régulo, Schwartz, Sonnenfeld, Waringhien. Stafeto 1961. 329p. Lingvo: bona.  
Preso: bona. Karaktero: Lingvo-studo. Takso: nur por tre spertaj esperantistoj.

La libro estas parto de longdaŭra gramatika argumentado. La problemo:  
"Al Esperanto mankas specifa tempo por la t.n. pasiva preterito (angl. was put  
to bed). "Estis enlitigata" signifas was being put to bed; "estis enlitigita" - had  
been put to bed. Do se ni volas traduki When I came home, the baby was put to  
bed, kion fari? (p.305).

La disputo estas inter tiuj personoj kiuj tradukas per "estis enlitigita" kaj tiuj  
kiuj tradukas per "estis enlitigata." La prezentata libro pledas por "estis -ita."  
La argumentoj apelacias al la zamenhofa uzo (tial la nomo "La Zamenhofa Esperanto"),  
al la Fundamento, kaj al la karaktero de la lingvo mem. Kelkaj el la verkintoj  
(ekz. Pumpr, kaj de Hoog, kies kontribuoj estas eble la plej klaraj kaj studindaj)  
ankaŭ prezentas la vidpunkton de la personoj kiuj volas "estas -ata," por refuti ĝin.

Mi ne estas konvinkita de la libro. Unue: ĉar mia propra studo de la zamen-  
hofa uzado indikas al mi ke Zamenhof uzis nek la sistemon de la "ataistoj" nek tiun  
de la "itaistoj" sed sistemon pli simplan: oni uzas la saman formon de est- kiun havas  
la verboj en la kunteksto, se oni volas esprimi staton aŭ agon kiu ankoraŭ ekzistas;  
oni uzas -ata por esprimi ke la ago ekzistas nun, kaj -ita por esprimi ke la ago ek-  
zistis kaj ni nun havas la rezulton (la staton). Do: "la infano estas enlitigita kaj  
dormas bone," kaj "hieraŭ, kiam mi venis al la domo, mi trovis ke la infano estis  
enlitigita kaj dormis bone," "hieraŭ, kiam mi venis al la domo, mi trovis ke la  
infano estis enlitigata por ke ĝi povu dormi."

Due, ĉar la argumentoj preskaŭ ĉiam ekzamenas la problemon sen la kunteksto,  
dum moderna lingvistika studado insistas ke neniuj formoj (vorta, gramatika) havas  
signifon ekster la kunteksto, sed akiras sian signifon per la kunteksto.

Nek la "-ita" skolo nek la "-ata" skolo plaĉos la anglalingvanon tute: mi  
kredas ke la vera zamenhofa uzado pli kontentigas, ĉar ĝi estas kohera kun la  
strukturo de la lingvo, do plej taŭgas por la lingvo.

Ĉi tie ne eblas detale konsideri la uzadon zamenhofan, aŭ aktualan. En detala  
recenzo aperonta en "The International Language Review" mi prezentas tian detalan  
konsideradon.

Unu rimarkigo plia: Pro la varmege de la batalado, la verkintoj en la "Simpozio"  
(kaj aliaj verkintoj en aliaj eldonaĵoj) troige parolas pri "danĝero" kaj minacanta ka-  
tastrofo kc. por la lingvo, pro la diskuto. (Pli ĝuste, pro la variantaj uzoj.) Tian  
alarmismon mi ne povas akcepti. La afero pritraktata estas obskura - mi mem legadis

esperantajn librojn dum pli ol dek jaroj antaŭ ol konscii ke opinivario tiurilata eĉ ekzista - kaj la ekzisto de la lingvo dum pli ol 70 jaroj indikas ke diversaj gramatikuzoj povas feliĉe kunekzistadi sen danĝero. Same kiel la iama disputado pri la gramatika karaktero de radikoj, kaj pri -io kaj -ujo, kc., ankoraŭ pridiskutataj sed kun malpli da fervoro ol iam, ĉi tiu disputado iom post iom senfervoriĝos. Tragedio estus, ne se la diversaj opinioj restus, sed se la Akademio decidus kateni la lingvouzadon per arbitra decido pri gramatika afero kiam la lingvostrukturo permesas plurajn eblojn.

Kvankam tre unuflanka, la libro estas rekomendata por personoj kiuj volas okupi sin per gramatikaj studoj profundaj. La ordinara esperantisto pli bone ignoros ĝin, kaj la problemon.

Donald Broadribb

## Ni Rekomendas

### INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Infanoj Ne Konas Limojn, 32 paĝoj da teksto de Sam Waagenarr, Georges Simenon, Heinrich Böll, Ito Saburo, 111 paĝoj da fotoj, kaj 7 p. da klariga teksto. Broŝurita. Eldonita de A. W. Bruna & Zoon, Utrecht, Nederlando, 1961. Prezo: \$1.10.

Ĉi tiu libro glorigas la infanon. Ĉiu konas la infanon, ĉiu amas la infanon, ĉiu ŝatas rigardi bildojn de infanoj. Por la infanamantoj, la nun prezentata libro liveras laŭdojn, pri-skribojn, kaj bildojn. Infanoj el Afriko, el Azio, el Eŭropo, el Aŭstralio, eĉ du el Usono. Infanoj nudaj, kaj vest-itaj; ludantaj, kaj plorantaj; dorlot-itaj kaj neglektitaj; ĉiam ĉarmaj. Ĝi estas bildlibro por ĉiu gepatro est-

onta aŭ estinta. La libron ni varme rekomendas.



Mendu ĉe la Esperanto League Book Service, Middleton, Wisconsin.

★

ĈIAM PORTU  
LA VERDAN STELON!

Esperanto bumper strips for your car  
- 25¢ each, 5 for \$ 1.00, from Catherine and William Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, California.

Sender:

ESPERANTO PRESS

Oakville, Ontario, Canada

Return and Forwarding Postage Guaranteed

**ESPERANTO, YOUR PASSPORT  
TO WORLD FRIENDSHIP**

Reprints of the popular Special Educational issue of the Review. Extremely useful for publicity work. Keep a supply on hand.

**NEW PRICE:**

Per Copy: 25c postpaid

Five copies: \$1.00 postpaid

Order from:

Adrian Hughes  
476 So. Bailey  
Hillsboro, Oregon

**THE NORTH AMERICAN  
ESPERANTO REVIEW**

The complete collection for 1961, attractively bound. A permanent record of Esperanto activities in America last year, official League actions, etc.

Price: \$1.80 postpaid

Order from:

Adrian Hughes  
476 So. Bailey  
Hillsboro, Oregon